- 8 -04- 1989

Jarkolekto 9 Marto 1989

# ESPERANTO en Belgio

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)
de BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Skotlandstrato 73
B-1060 BRUSELO
Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever):
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

ESTRARO:

Prezidanto:
Marc DEMONTY, profesoro, Schoolstr. 3, 1710 Dilbeek

Vicprezidantoj:
Georges Bonnois, rue de la Consolation 2, 6400 Couvin
Ivo DURWAEL, instruisto, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem

Ĝenerala sekretario:
André MERTENS GOOSSENS, hon. bankestro, Priorijstr. 4, 1720 Dilbeek

Kasisto:
Roger DE SCHEPPER, inĝeniero, Doornstr. 22, 2610 Wilrijk

Financa konsilanto:
Grégoire MAERTENS, em. inspektisto, Pr. Leopoldstr. 51, 8310 Brugge

ALVOKO !

Kandidatoj por la nova estraro estas ege bonvenaj: ili bonvolu sin prezenti al la nuna prezidanto tel.(02) 5693133 !
Kanditatiĝoj estas riceveblaj ankaŭ dum la jarkunveno !

**ESPERANTO EN BELGIO**

Pro financaj kialoj la bulteno aperas nur post speciala decido de la estraro.

## INVITO AL ĜENERALA JARKUNVENO de BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

Kiel antaŭvidite dum la lasta jarkunveno de BEF kaj jam anoncite dum la decembra Zamenhoftago, ni konfirmas al vi la okazigon de nia venonta ĝenerala kunveno, kiu okazos la 22-an de aprilo 1989, en la sama ejo , nome la renkontcentro situata je numero 5, de la Malnova Grenmerkato , 1000 Bruselo ( tel 02/512 34 25 ), proksime de la Borso .

La kunveno okazos en la periodo antaŭvidita en la statutoj, ĉar estos necese decidi kun sufiĉa kvorumo kaj reprezentado de la asocioj membriĝintaj en BEF pri jenaj punktoj , kiuj fakte estas interplektitaj :

1) Prezentado de la decidoj kaj proponoj de la ĝenerala jarkunveno de la 26/11/88 kaj de la speciala financa kunveno de la 23/12/88 .
2) Precizigo kaj aprobo de la rilatoj inter BEF kaj APE.
3) Elekto de la nova administrantaro surbaze de la proponoj de la diversaj asocioj .
4) Elekto de nova(j) estrarano(j) de BEF .
   Kandidatoj bonvolu laŭeble anonci sian kandidatiĝon skribe antaŭ la kunveno al la nunaj estraranoj .

Al tiuj minimumaj tagorderoj aldoniĝos tiuj kiujn vi aŭ ni proponos dum la restanta periodo.

Ni klopodas ĉi-foje sendi tiun-ĉi invitilon sufiĉe frue kaj larĝskale, post reviziado de la listo de ricevantoj. Tio certe ebligos al vi pli taŭgan preparon kaj diskonigon de la kunveno, tiel ke neniu sentu sin forgesita, eĉ ekster nia volo .

Bonvolu noti krome ke tiu-ĉi kunveno havas specialajn kaj limigitajn celojn, kaj ke do ne estos la kutimaj aŭtunaj raportoj.

Praktike ni proponas jenan tempodisdividon :

10 - 12 : Preparkunveno de la nunaj kaj estontaj estraranoj
12 - 14 : Manĝo_bleco en la ĉirkaŭaĵo aŭ en la ejo mem, kie trinkaĵoj estos daŭre haveblaj .
14 - 16 : Ĝenerala asembleo .

Esperante revidi vin multnombre dum tiu kunveno, al kiu ni jam bonvenigas vin , sincere salutas , nome de la BEF- estraro

Goossens : prez

Marc Demonty, prezidanto .



BELGA ESPERANTO-FEDERACIO
ASPC
Skotlandstr. 73
B-1060 BRUSELO

*Jarraporto 1987-88.*

Sinjoro Prezidanto, Gesinjoroj administrantoj, Karaj samideanoj,

Multaj inter ni pensas ke la agado de B E F konsistas nur el administraj taskoj. Mi eĉ kelkfoje aŭdis ke iuj bedaŭris ĉar B E F ne partoprenis al iu grava Esperantista aranĝo ! Mi pensas ke temas pri erara rimarko, kaj mi tuj klarigos:
B E F estas nia landa asocio kaj la t.n. kupola organizo de F E L kaj A P E...
La administrantaron de B E F partoprenas administrantoj de tiuj du regionaj asocioj kaj ankaŭ de aliaj asocioj kiel la Junulara Asocio, la Belga sekcio de I L E I, la B E F A, la direktoro de Sonorilo, la administranto de belgaj fondaĵoj, kaj laŭstatute kooptitaj membroj de la ĝenerala kunsido.
Sekve B E F havas reprezentantojn en preskaŭ ĉiuj E-organizoj de la lando, kaj tiuj homoj rajtas reprezenti la B E F en ĉiaj gravaj aranĝoj kie la ĉeesto de la landa asocio povas necesi aŭ utili : kaj tiel B E F partoprenas fakte multajn aranĝojn dum la tuta jaro...
Laŭ mi estas ankaŭ konsilinde ke la lokaj komitatoj de aranĝoj, kiuj volas doni al iuj renkontoj nacian aŭ internacian gravecon, kaj kiuj volas inviti aŭ alogi homojn el aliaj regionoj aŭ landoj, profitu la partoprenon de la landa asocio kaj menciu ĝin en sia reklamo !
Kiel ĉiujn jarojn, BEF havis tamen ankaŭ specifajn aktivaĵojn:
BEF organizis la lastan laŭstatutan jarkunvenon je 28.11.87.
BEF prizorgis la lastjaran administradon de Klubo 100, kies financan raporton faris la sekretario.
Klubo 100 siaflanke organizis kun la Brusela Grupo la Centjaran Zamenhoffesto je 12.12.87.
BEF devas sendi landan delegiton al la UK, peti al la Ministro pri Eksterlandaj aferoj sendi ambasadoron aŭ reprezentanton al la UKE...
BEF prizorgis la rilatojn kun la oficialaj instancoj de la Ministerio...
BEF akiris renovigon de la rajto pri la subtraho de donacoj el la impostdeklaracio de la donacantoj. La dekreto aperis en la Belga Ŝtatgazeto je 27.11.1987 t.e. precize unu tagon antaŭ la jarkunveno !
BEF jam petis al la Ministerio saman rajton por la venontaj jaroj.
BEF ricevis ĉijare ankoraŭ malavarajn donacojn kaj decidis dediĉi parton por subteni la baldaŭan eldonon de nova bildrakonto "Esperanto - Zamenhof".

La sekretario,
André Mertens Goossens.

BELGA ESPERANTO FERVOJISTA ASOCIO
BEFA

# J A R R A P O R T O   D E   B E F A

Agado de BEFA depost la lasta Ĝenerala Jarkunveno de BEF

BEFA partoprenis en :

- la Zamenhofa festo de Clubo Cent en BRUSELO (12.12.87);
- la tago de la Amikeco en LOVANO (27.02.88);
- la serĉpromenado de la Genta Grupo "La Progreso" (28.05.88);
- la 40a IFEF-Kongreso de PERPIGNAN (F) de la 4a ĝis la 10a de junio 88, kaj la postkongreso de ANDORO de la 11a ĝis la 14a;
- la semajnfina aranĝo de la Karoloreĝa Grupo en CUL-DES-SARTS (02+03.07.88);
- la fervojista tago de la 73a Universala Kongreso de ROTTERDAM (28.07.88);
- la Nordia Kunveno (DK + N + S + SF) en RY (DK) (16-18.09.88);
- la Ĝenerala Jarkunveno de FFEA (niaj frandaj kolegoj) en HOULGATE (Normandio) (23-25.09.88);
- la Ĝenerala Jarkunveno de GEFA (niaj germanaj kolegoj) en KAISERSLAUTERN (07-09.10.88);

BEFA organizis en ABERGAVENNY (Kimrujo, GB) de la 8a ĝis la 15a de aŭgusto, tutsemajnan trilandan aranĝon (B - GB - NL) al kiu partoprenis 57 kongresanoj el 8 landoj.
La celo estis revigligi kelkajn landajn IFEF-sekciojn.

BEFA organizis de oktobro 87 ĝis aprilo 88 konversaciajn Esperanto-kursojn je du niveloj (komencantoj kaj progresantoj), du sabatojn po monato, en konferencejoj de la Ĝenerala Direkcio de la Belgaj Fervojoj. 25 partoprenintoj.
Ĉi-jare en oktobro, BEFA reenkondukis tiujn kursojn, sed je tri niveloj kaj 4 klasoj. 35 partoprenantoj.
La samajn sabatojn okazas posttagmeze prelegoj, konferencoj, ktp.

BEFA organizas ankaŭ perkorespondajn kursojn.

BEFA kunlaboris en la IFEF-Terminara Komisiono, kies tasko estas traduki la pli ol dekmil fakaj vortoj de la kvara eldono seslingva de la leksikono de UIC (Internacia Unio de la Fervojoj).

La 21en de novembro, la prezidanto de BEFA prelegis en la Lieĝa Esperanto-Grupo pri TGV-trajnoj (Grandrapidaj trajnoj).

La venonta IFEF-Kongreso, la 41a, okazos en SALOU (E) de la 14a ĝis la 20a de majo 89 kun postkongreso en MAJORKO, de la 20a ĝis la 24a de majo.

Ni rememoras ke ĉiuj niaj aranĝoj, ĉu naciaj, ĉu internaciaj, estas ankaŭ alireblaj al ne-fervojistaj Esperantistoj.

Kompilis,
Lucien DE SUTTER,
Prezidanto de BEFA.

Bruselo, la 26an de novembro 88.



ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO
APE
ASOCIO POR ESPERANTO

SECTION DE
BELGA ESPERANTO FEDERACIO
AFFILIÉE A
UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO
(En relations consultatives avec l'UNESCO)
Rue Montoyer 37/B 24
1040 BRUXELLES

# AGADO DUM LA PERIODO 1.7.87 - 30.6.88.

La komitatanoj kaj pluraj geanoj de APE ĉeestis la Varsovian Kongreson, kaj ankaŭ la trilandliman renkontiĝon en Welkenraedt-Limbourg (Belgio) kaj en Wijlre (Nederlando).
Ili helpas ankaŭ al la Gazetara Servo. Pri tiu, mi malemas diri ke S-ro Pirotte ne plu deziras esti menciita ĉe la dorsa paĝo de nia revuo, ĉar li volas malpliigi sian partoprenon.

Cetere, mi bedaŭras atentigi vin ĉiujn ke, krom 4 kursoj kiujn mi gvidas, mi devis - pro manko de aliaj bonvolemuloj - roli pri la sekretarieco kaj verki la revuon "Esperanto en Marche", tial restas malmulte da tempo por fari, eĉ por pripensi aliaĵon.

Pri la revuo, je la komenco de la deĵorjaro, ĝi aperis regule, tamen pro malbona sanstato, mi ne povis prizorgi ĝustatempe la numeron 5-6/88; konsekvence, ĝi sufiĉe longe malfruiĝis kaj la postaj ankaŭ. Nuntempe, la malfruo estas neniigita : la numero 9-10/88 estas ĉe la presisto kaj la lasta, kredeble, aperos dum decembro.

Pasintan jaron, ni malpliigis la nombron da ekzempleroj ĝis 1700; ĉi jare UEA decidis presigi "Esperanto en Afriko", en Budapeŝto pro pli malaltakosto; do, ili ne plu aĉetas la 500 ekzemplerojn de nia revuo; ni presigas nun ĉirkaŭ 1200 ekzemplerojn.

Ni denove malfermis la kursojn en Flémalle kaj Marche-en-Famenne kun la helpo de la tieaj progresaj gekursanoj; dank'al tio aperis artikoloj en la regionaj gazetoj, estis gluitaj afiŝoj kaj, en Marche, okazis parolado de S-ro Derzelle. Por tiuj kursoj, ni aĉetis kvanton da lernolibroj kaj vortaroj. Ek de la fondiĝo de la du novaj grupoj, tion ili faras mem.

Gazetara Servo kaj SUK estis finance subtenataj de APE.

Dum la pritraktata periodo, ni bedaŭris la forpason de D-ro Pol Denoël, honorprezidanto de BEF kaj prezidanto de la Lieĝa grupo, kaj de Toussaint Demarche kasisto de la Verviers'a grupo. Ni honoris ilin siatempe.

Vivo de la Grupoj.

BRUSELO : pri tiu grupo, mi scias ke konversacia rondo estas prizorgata por kelkaj oficistoj de la RTBF.

CHARLEROI : organizis sian jaran piknikon en Monceau-sur-Sambre. Tri membroj partoprenis la UK-on en Varsovio. La geanoj kunsidas ĉiusemajne kaj pluraj kursoj funkcias en la regiono (3 elementaj, 3 perfektigaj kaj unu perkoresponda). Tiu grupo akurate prizorgas la sendadon de "Esperanto en Marche", kaj pluraj anoj aktivas por la Gazetara Servo. En 5/88, la prezidanto paroladis en Petit-Wasmes pri "Esperanto, ponta lingvo por la estonteco".

EUPEN : okazigis kurson en la loka ateneo. Esperantista tago kun akceptado de la urbestro estis aranĝita de S-ino Vertongen, okaze de la centjariĝo.

FLEMALLE : la grupo naskiĝis dum decembro 1987. La 6an de aprilo estis organizita distra posttagmezo kun la kunlaborado de la Klubo de la Pensiuloj, kie paroladis S-ro José Jacob, prezidanto de la Verviers'a grupo, pri la vojaĝo al la Varsovia Kongreso. Ĉirkaŭ 70 personoj ĉeestis. Tie funkcias du kursoj : elementa kaj progresiga. La delegita al "Monda Turismo", membro de tiu grupo, intense aktivas

por tiu fako.

LIEGE : dum la pritraktata periodo, la grupo kunsidis 19-foje : okazis paroladoj (kun aŭ sen diapozitivoj), distraj aŭ kulturaj kunvenoj; ĉeestadis ĉirkaŭ 15 personoj. Kursoj : 2 elementaj, unu perfektiga, unu perkoresponda. Grupa membro gastigadis 2 afrikajn samideanojn kaj 3-personan familion el Lyon.

MARCHE-EN-FAMENNE : dum decembro 1987, en Marche naskiĝis esperantista grupo (la kursoj funkciis ek de januaro 1985) en la loka kulturcentro. Antaŭ la malfermo de la kurso, S-ro Derzelle paroladis pri la gramatika strukturo de la lingvo. La gegrupanoj sendis plurajn artikolojn al la regiona gazetaro. Kelkaj el ili aperis. En junio, la reprezentanto de la Juna Ekonomia Ĉambro filmis nian kurson en plena laborado.

NAMUR : kursoj estas gvidataj de S-ro Derzelle, kiu cetere estis intervjuita ĉe la radio-elsendejo.
S-ino Tilleux laboradis kun multaj zorgoj al la realigo de bildo-rakonto pri la "Vivo de D-ro Zamenhof". Ni esperas ke ĝi estos baldaŭ eldonata.
En Gembloux, S-ro Delhaye ege aktivadas : li gvidas kursojn en la lokalo "Maison Internationale" alaĵo de "Faculté des Sciences Agronomiques"; li plurfoje prelegis por informi la profesorojn kaj la studentojn; temoj : "Quelle est l'utilité de l'Esperanto?" - "La Caravane pour Varsovie" kaj "Les recherches concernant DLT."

OLNE : S-ro Rabosée partoprenis dum marto en Welkenraedt 3-tagan informadon por la lernejanoj.
Bedaŭrinde, tiu grupo malprosperas.

VERVIERS : la grupo aranĝis 14 kulturajn kunsidojn, partoprenis la piknikon en Charleroi, la pilgrimon en Banneux, la UK-on en Varsovio, 2 trilandlimajn renkontiĝojn (Wijlre, Welkenraedt), la Zamenhof-feston en Bruselo, helpis al la 3taga informado en Welkenraedt, kaj dum aprilo, la prezidanto paroladis en Flémalle pri la vojaĝo al Varsovio.
La prezidanto gvidas kurson por la infanoj de la lernejo IRIS, en Verviers (sistemo Freinet). Lernanto el la Ŝtata Pedagogia Instituto el Liège observis tiun laboron kaj redaktis 28-paĝan lastjaran verkon pri ĝi. Du studentoj de la turisma sekcio de la sama Instituto intencas partopreni vojaĝon per Monda Turismo.
La grupo organizis kurson per komputilo, cetere 3 personoj estis direktitaj al la perkoresponda kurso de Liège.
Pluraj bonaj artikoloj pri la centjariĝo aperis en la regiona gazetaro kaj estis eldonita malgranda propagandilo por inviti la homojn al la kursoj.

WELKENRAEDT : du elementaj kursoj funkcias kun entute 6 gelernantoj. Okazis diversaj aktivaĵoj : parolado kun diapozitivoj (20 personoj), ekspozicio dum kiu estis montrata la filmo de la Eŭropa Komunumo, ekspozicio dum lerneja festo (100 vizitintoj), 3-taga informado en la "Malfermita Lernejo" en Kulturcentro (140 infanoj) kun raporto en la gazetaro, trilandlimaj renkontiĝoj (partopreno en Wijlre, organizado en Welkenraedt-Limbourg), partoprenado al spektakloj kaj prelegoj en Antverpeno, Verviers, Flémalle, Louvain, al junulara renkontiĝo en Westmunster, al Zamenhof-festo en Bruselo, al staĝo en Grésillon, kaj helpado al la infana kongreseto en Varsovio.
Abono al kelkaj revuoj kaj aĉeto de libroj. Donaco de du libroj en Esperanto al la loka biblioteko.

L. Drèze
29.10.88

---oOo---

Flandra Esperanto-Ligo
vlaamse esperantobond V.Z.W.
esperanto
internationale taal

KONCIZA JARRAPORTO DE F.E.L. 1987 - 1988

I. Interna agado

- Fondiĝis tri novaj grupoj : Oostende, Halle kaj Genk.
- Jubileis la 80-jara Antverpena grupo "La Verda Stelo", je la 26a de septembro 1987.
- Okazis studotago por kursgvidantoj je la 21a de novembro 1987. En Loveno okaze de la festo de la Semajno de la Internacia Amikeco je la 27a de februaro 1988, okazis informkunveno pri la novaj strategioj de F.E.L.
- Por la IJK en Krakovo kaj la UK en Varsovio, ni organizis sukcesan busvojaĝon al Pollando de la 16a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1987.
- Ni plickupiĝas pri la perado de revuoj kaj okaze de malfacilaĵoj translimaj, estrarano transprenis la taskon solvi tiajn problemojn.
- Ni ankaŭ sukcese solvis la problemon rilate membrojn kiuj pagas kotizojn rekte al F.E.L. sed kiuj ne indikas lokan grupon. La flandra teritorio nun estas dividita inter la ekzistantaj grupoj.
- Okazis du ĝeneralaj kunvenoj en Antverpeno nome je la 17a de oktobro 1987 kaj la jarkunsido je la 12a de marto 1988.

II. LISTO DE PLANOJ

Konstatante ke ni faras tro multe da laboro, broŝuroj, informoj, k.t.p. por Esperantistoj, ni decidis eliri nian fermitan rondon petante profesian helpon. Danĝera paŝo en tiu direkto okazis en 1986. Unu el la plej okulfrapaj rezultoj estis la domstilo.
Duan paŝon kelkaj estraranoj faris en silento dum 1987. Uzante profesian libron pri organizado en neprofitcelaj organizaĵoj, ni venis al komunaj starpunktoj kaj konkludoj por konkretigi niajn celojn, atentante niajn nunajn eblecojn.
Sekve listo de planoj estis kunmetita kun urĝaj kaj ne tiel urĝaj taskoj, realigendaj en la tuja aŭ ne tiel fora estonteco.
Tiu laborplano estas regule adaptita kaj revizorita. Kelkaj konkretaj taskoj sukcesis, aliaj ne.
Sukcesis i.a. la sistemo de la deponado de lernolibroj en butikoj uzante la servojn de la lokaj kluboj - la eldono de la afiŝo kun aloga slogano "Esperanto, laat je verleiden" (kvankam estis kritiko, la esenco estas ke temas pri profesia aspekto de bildo kiu trafas, laŭ la opinio de profesiaj fakuloj, ne-esperantistajn) - la kunlaboro kun aliaj landaj asocioj specife kun Nederlando (ekz. interŝanĝo de informoj rilate al kadrokursoj por kursgvidintoj ankaŭ dum informtago) - la modernaspekta ekspozicio farita el taŭga materialo.

Nesukcesis i.a. la depono ĉe bibliotekoj de la libro "Kazinski venas tro malfrue" pere de la ministerio - la interŝanĝo kun orienteŭropaj landoj kaŭze de la restrukturiĝoj tie.

III. F.E.L. konstataske ĝi havas grandajn enspezojn pro sia libro-eldonado. Okaze de la Zamenhoftago ĉi jare, ni eldonos la 15an libron; tiu kvanto ŝefe eldoniĝis ekde 1986. Por siaj eldonoj, F.E.L. neniam apelaciis je iu ajna financa apogo; la vendado de antaŭaj propaj eldonoj ĉiam kovris la kostojn por la novaj eldonoj. La libroservo estas tre sukcesa enspezfonto por F.E.L.

IV. Estonteco

Ni okazigas regule studotagojn por interesuloj, gvidatajn de fakuloj ne-esperantistaj. Unualoke ni celas difini konkretan kampanjon kaj limigitajn celgrupojn.

mc/26.XI.1988

# KLUBO 100

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1987 Tot. saldo kontoj 68020+? | Saldo bankkonto | 43020 | Saldo konto de FEL 25000+? |
| | BankinterASLK/CGER | 2095 | |
| | Imposto | -524 | |
| 1988 Tot. saldo kontoj 69591+? | Saldo bankkonto | 44591 | Saldo konto de FEL 25000+? |

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

? = La ciferoj estas kompletigotaj per la kontoj de FEL

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

$$ Subtenu la landan Esperanto-movadon $$

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

## Aliĝo al Universala Esperanto-Kongreso

Se oni pagas sian aliĝon al la Universala Kongreso pere de BEF, oni finance helpas la landan Esperanto-movadon, ĉar ĝi ricevas makleraĵon. Do, bonvolu pagi al pĉk 000-0163434-86, Belga Esperanto-Federacio, Bruselo, menciante 'kotizo UKE'. Ankaŭ ĉe la kasisto de BEF, kiu estas la landa peranto por la Universalaj Kongresoj, la aliĝiloj estas disponeblaj ( tel (03) 4403092 ).

## Malpliigo de impostoj pro donacoj al BEF

Ni rememorigas al niaj legantoj pri la ebleco malpliigi siajn impostojn pere de donacoj (minimume 1000 fr.) al BEF. Tiu sistemo estas duflanka:

1. la donacinto ĝuas rabaton je siaj impostoj, do pagas malpli;
2. li/ŝi grave helpas venki la financajn bezonojn de BEF.

Kiuj samtempe i.a. ne permesas la eldonon de nia 'monata' bulteno.
Pĉk 000-0163434-86, Belga Esperanto-Federacio, 1060 Bruselo.
Nura mencio: "DONACO".